

Christian Winther,
Flugu, ho bird'

tradukita de Kristian Langgaard

Flugu, ho bird' trans la ondojn de l' lago!
Nigra la nokt' venos nun.
Jen post l' arbar' malleviĝas la tago
Kaj ŝtelforiras la sun'.
Nun vi rapidu al via in' pluma,
Kaj flavbekuloj apud ŝi;
Sed kiam tago krepuskos, la luma,
Diru pri ili al mi!

Flugu, ho bird' trans la ondojn brilantajn!
Via flugil' portu vin!
Se vi renkontos du homojn amantajn,
Ho – vi esploru ŝin kaj lin!
Kiel poeto ja koni mi devus
Ĉion pri l' feliĉo de l' am',
Ĉiun doloron – la voĉon mi levus
En ovacia deklam'.

Flugu, ho bird' trans la siblon de l' lago!
Amo vin logas al ŝi.
Sidu nun inter susuro de l' fago,
Kantu pri ŝi kaj pri vi!
Se mi nur povus eteren min levi,
Scius mi, kien iros mi.
Sola povas suspiri kaj revi -
Mia amfrukt' estas ĝi

...

Flugu, ho bird' trans la bluan akvaron!
 Flugu al ŝi, flugu for!
 Ie vi trovos solecan arbaron,
 Kien sopiras la kor'.
 Ora flirtetas harar' en venteto,
 Gracila ja estas ŝi,
 Nigraj okuloj kaj roza vangeto,
 Ho – ja ekkonos ŝin vi.

Flugu, ho bird', trans la lagan bruadon !
 Aŭdu! La nokta ĝemad'!
 Flustras la arboj timeman sibladon -
 Estas vespersalutad'.
 Birdoj eĉ sentas de l' amo doloron
 Same kiel homoj ni.
 Kiu konsolu nun mian koron?
 Nun „Bonan nokton!“ al vi.

*Traduko de la Dana poemo “Flyv fugl, flyv” de CHRISTIAN WINTHER (Kristiano Vintero, *1796 – †1876) en Esperanton de KRISTIAN LANGGAARD (*1894 – †1957).*

Arg-355-703 (2009-05-16 12:17:06)

Tiun poem-esperantigon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la libro “Esperanto-poemoj”, eldonita en 1937 de la dana eldonejo “SEFO”, Nykøbing. (En la kelkaj strofoj de la esperantigo verkita de la tradukinto K. Langaard mi faris kelkajn modifojn, por pli konformigi la versritmon al la dana-lingvo originalo. La kvar lastajn liniojn mi provis aliigi komplete.)